


BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



6

*JUNIO 1960 * JARO XXIX*

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01.

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov

Redakta komitato: Ivan Sarafov,
Stefka Ĥristova, Stefan Kiraĝiev,
Stefan Maserov, Simeon Simeon-
nov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Reklamoj. Ekstera kovrilpaĝo: tuta
— 1000 levoj, duono — 500, kva-
rono — 280. Interna: tuta — 900,
duono — 450, kvarono — 250. Ko-
respondanoncoj — 1 levo por vor-
to; eksterlandaj adresoj — sen-
page.

PERANTOJ DE «BULGARA ESPERANTISTO»

Albani: Inĝ. Cefo Fico 44 Rruga
Stafa, Tirinë.

Koreo: Korea Esperanto-Asocio
Pjeng' jang, P. O. kesto 16.

Sovetunio: J. Kudrjavickij, PK 1255
Moskva K-9

Nederlando: Ru Bossong Flora-
plein 23, Eindhoven.

Rumanio: Mihail Popescu, Cal. 13
Septembrie 65, Bucuresti 5.

V. Oljanov. Ĉu ni jam estas 1
pretaj?

Membroj subtenantoj 2

Organiza vivo (V. Ĥristozov —
Dimitrovgrad, I. Dobrovski —
St. Dimitrov, St. Kadiev —
Sofio, D. Ĥristova — Bankja,
E. Daskalov — Vraca, N. Nej-
kov — Drjanovo, Nova sami-
deano — Nova Zagora, B. Ka-
valĝiev — Ruse) 2

Nombro de la aliĝintoj 5

Grava korekto en la statuto 5

Junularo sur posteno (J. Dimi-
trov — Ruse, E. Daskalov —
Vraca) 6

S. Dâlbokov. Esperantistoj pere-
intaj por la libero — Vârban
Genĉev 7

I. Sarafov. Nia kongresurbo 9

P. Poliŝĉuk. Versaĵo pri brikoj 11

I. Schoon. Spirito limojn spitas
(versaĵo) 11

Mikaelo. Kiel la verdstelanino,
Gajno kaj perdo 12

M. Boulton. Kata saĝeco 13

St. Maserov. Ĉu efektive Espe-
ranto bezonas novajn vortojn? 14

El la mondo de la instruistoj-
esperantistoj 16

Sur la kovrilo: La romantika
Târnovo

LA REDAKCIO akceptas ma-
terialojn por la koncerna nume-
ro de «Bulgara esperantisto»
ĝis la 12-a de la antaŭa monato.
Nur kiel escepto gravaj aktua-
laj materialoj estos akceptataj
ĝis la 25-a de la antaŭa monato.

La aŭtoroj estas petataj skri-
bi tre klare, kun granda interli-
nia spaco kaj margeno. Manu-
skriptoj ne estas resendataj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

ĈU NI JAM ESTAS PRETAJ?

Ĉiu kongreso faras ne nur revuon de la pasigita vojo, pritaksas ĝin, markas la direkton antaŭen. Ĝi donas novan puŝon al nia E-movado. Ĝi donas ion novan signantan la supreniron de la movado. Ĝi forigas parton de la ekzistantaj baroj de objektiva kaj subjektiva karaktero. Sed ĉu la kongreso pli aŭ malpli brile plenumos siajn taskojn de stimulant, de entuziasmiganto, de antaŭenpuŝanto, ĉu ĝi inokulos novajn vivigajn hormonojn en la sangon de la E-movado, — tio dependas grandparte de la antaŭkongresa mobilizo kaj sinpretigo de ĉiuj eroj de nia asocio.

Ĉu ni estas pretaj?

Restis ne multaj tagoj ĝis la kongreso. La tempo kuras kaj se ni ne streĉas niajn fortojn ĝi postrestigos nin. El kio konsistas la prepareco?

Unua kondiĉo por bona prezento en la kongreso estas la organiza stabiligo de la societoj. La tabelo publikigita en n-ro 5 de «Bulgara Esperantisto» pri la organiza konkurado 1959 montris al ni la nekontentigan staton de la societoj. Nur 10 el ili plenumis kaj superplenumis la planon pri membroj kaj abonantoj. 40 societoj ne atingis eĉ 50-procentan plenumon. Inter ili tiaj societoj kiel tiuj en Burgas, Gorna Orjahovica, Kârĝali, Levskigrad, Plovdiv, Sliven, Tolbuhin, Trojan, Varna k. a. Pleven kiu montris grandan aktivecon en la komenco de la pasinta jaro, en la dua duonjaro evidente malstreĉis siajn fortojn kaj rezulte plenumis la planon nur je 50%. Ĉu ne estas hontinde sin prezenti antaŭ la kongreso kun tiaj rezultoj? Ni firme kredas, ke la societaj estraroj de la postrestintaj societoj okupiĝos speciale pri la organiza stato kaj organizos konkretajn entreprenojn por ilia organiza stabiligo. Dum tiu ĉi jaro ĉiu societo devas havi konsiderinde pli da regulaj membroj ol dum la pasinta. Ni devas digne nin prezenti al la 34-a.

Ĝis la 25-a de junio devas okazi la antaŭkongresaj kunvenoj por elekto de delegitoj. Oni elektos po unu delegiton por ĉiu deko da regulaj membroj aŭ parto de deko, konsiderante la meznombrojn de la societaj membroj por 1959 kaj 1960 jaroj. Ĝis la fino de junio CK de la asocio devas ricevi la nomojn de la delegitoj kun ĉiuj necesaj informoj (aĝo, klereco, ekde kiam estas esperantisto), por ke oni preparu la delegitkartojn. La kunvenoj devas komisi al la delegitoj defendi ties opiniojn kaj

proponojn. La delegitoj devas bone pristudi la raporton de CK de BEA kaj prepari siajn diskutparolojn. Ili devas esti koncizaj, konkretaj, sen nenecesaj detalaĵoj. Tiumaniere ni povos havi seriozan, fruktodonan kongreson. Ni devas montri al la socio nian organizan kaj idean maturiĝon.

La malmultajn tagojn restintajn ĝis la kongreso ni utiligu por mobilizo de niaj fortoj, por fortikigo de niaj organizaĵoj. Nun pli ol ĉiam estas necesa la regula kunvenado, eĉ plioftigita por pritrakto de la antaŭkongresa preparo, de la organizaj demandoj, por praktikado de la lingvo, por lerno de Esperanto-kantoj.

Ni preparu nin serioze kaj sisteme por nia ĝoja festo. De tiu antaŭpreparo, de la organizita kaj sukcesa laboro de la kongreso ja dependos la sekvonta antaŭenmarŝo de nia kara Esperanto-movado.

ORGANIZAJ *vivo*

MEMBROJ SUBTENANTOJ

En tiu ĉi kolono ni publikigas la nomojn de ĉiuj **gesamideanoj**, kiuj krom la regula jara membrokotizo alpagis pluse almenaŭ 10 levojn. Per tiu modesta donaco ili subtenas kaj plifortikigas nian movadon. Sed iuj societoj subtaksas tion kaj ne varbas membrojn subtenantojn. Estas honora tasko de ĉiu societo havi kiel eble pli da membroj subtenantoj. Ili devas noti en la membrokarton la kategorion por la koncerna jaro per la literoj MS.

24. Georgi Burĥanlarski — Sofio

25. Vasil Ĥristov — Sofio

26. Nikola Aleksiev — Sofio

27. Aleksandâr Skobin — Sofio

28. Ivan Malinski — Sofio

Dimitrovgrad. La esperantistoj de la du societoj ĉefrunte kun flirtantaj standardoj, granda portreto de Zamenhof kaj grandega slogano partoprenis la unuamajan feston.

Pasante antaŭ la tribuno kun la oficialaj personoj, kelkfoje ni laŭte elparolis: vivu BKP, vivu Esperanto, vivu la mondpaco.

La radioparolanto kun forta voĉo anoncis: «Flirtas la verdaj standardoj, pasas la kolono de la esperantistoj — la plej obstinaj batalantoj por mondpaco kaj reciproka interkompreniĝo de la popoloj.» Multaj fotoaparatoj direktiĝis al la esperantista kolono. Ni rikoltis grandan sukceson juĝante laŭ la daŭraj aplaŭdoj, kiuj akompanis kaj postsekvis nian triumfan marŝon.

Stanke Dimitrov. La 24-an de aprilo nia societo «Marek» kunvenis kun la jena tagordo: organizaj demandoj, sciigoj pri 34-a Esperanto-Kongreso kaj aŭskultado de sonbendo pri 45-a Universala Esperantista Kongreso. Ĉeestis 34 anoj de la societo. Dudek kvar personoj aliĝis al la 34-a Bulgara Esperantista Kongreso en Târnovo. Kun granda atento oni aŭskultis la sonbendon pri la preparlaboroj al la 45-a Universala Kongreso en Bruselo.

La k. j. grupo da geesperantistoj el nia societo vizitis vilaĝon Sapareva Banja, kie ripozas la pioniro de nia movado Ivan Krâstanov. Li akceptis nin ĝoje kaj entuziasme parolis pri siaj esperantaj travivaĵoj. Ĉe la renkonto ĉeestis ankaŭ kursanoj de la nuna, ankoraŭ nefinita kurso por komencantoj.

La dua kurso de Esperanto daŭrigas sian laboron sub la gvidado de Boris Drenski. En ĝi enskribiĝis 25 personoj, sed ĝis la 23-a leciono restis nur ses. Malgraŭ tio, ni estas kontentaj, ĉar la restintoj estas bonaj kaj sindonaj esperantistoj kaj jam fariĝis anoj de nia societo.

Ivan Dobrovski

Sofio. Karaj gastoj en niaj medioj estis la rumanaĝesamideanoj Gizela Harabaĝiu kaj Konstantin Sârbu. Ili partoprenis la unuamajan manifestacion kune kun la esperantista grupo kaj eksentis ĝian entuziasmon kiel ankaŭ la bonan rilaton, kiu havas nia loĝantaro al la esperantista movado. La sekvantan tagon ili partoprenis la ekskurson al Vitoŝa kune kun niaj gekamaradoj kaj estis ravitaj pro la beleco de nia montaro. Ili vizitis unu E-kurson kaj vidis kiamaniere ni laboras ĉe la formado de la novaj samideanoj. Unu granda grupo da esperantistoj akompanis ilin ĉe la stacidomo. Ni eksciis de ili, ke por la kongreso en Târnovo aliĝis jam centoj da rumanaĝesamideoj. Kun ĝojo ili forportis al Rumanio niajn esperantajn kantojn kiel ankaŭ pecojn de nia relative alta sperto en la movado.

*

Ankaŭ ĉijare unu el la plej imponaj travivaĵoj de nia movado estis la partopreno en la unuamaja manifestacio. Antaŭ la ekiro ni havis la eblecon kanti multajn Esperanto-kantojn, danci kaj amike paroladi. Pli ol 300 gesamideanoj de diversaj aĝoj kaj profesioj formis la kantantan kolonon de nia samideanaro. La portreto de Zamenhof, la grandaj verdokoloraj sloganoj, la multnombraj verdaj flagetoj, distingis klare nian kolonon de la cetera multnombra civitana amasego. Nia kolono ne estis trankvila kaj silentema. La kantoj ne ĉesis dum la tuta tempo. La plenvoĉe kriita slogano «Esperanto-paco» estis aŭdita multfoje de la oficialaj reprezentantoj sur la tribuno. Ili bone scias, ke la esperantismo kreas unujn el la plej konsekvencaj kaj plej senlacaj batalantoj por la mondpaco.

*

Ĉiulunde la esperantistoj el Sofio kaj iliaj gastoj regule kunvenas en la salono sur strato Rakovski 72, je la 19.30 h. Ĉiu kunveno havas sian interesan programon. Unu ĉefa raporto ĉiam donas la fundamentan spiriton de la kunvenoj. Foje k-do Murgin raportis pri sia gastado en Anglio. Alian fojon k-do Hesapčiev rakontas belvorte pri sia laboro en Pollando. Dum unu kunveno oni pridiskutas la bulgaran filmojn «Domo sur du stratoj» laŭ la raporto pri ĝia kreado fare de D. Ĥitrov, laboranta en la departemento de la Bulgara Kinematografio. Oni aŭdis la raporton de la greka s-ano Griniatsos, unu el la advokatoj en la proceso de Manolis Glezos. Li rakontis pri la vivo de la grekaj geamikoj, inter kiuj estas d-ro Stamatidis, jam 93 jaraĝa, kolego kaj amiko de Zamenhof, ankoraŭ vigla kaj laborema



por Esperanto. Niaj regulaj kunvenoj estas vizitataj de 80-90 ĉeestantoj.

Ĉiujauĉe faras siajn ekzercojn la kantista grupo ĉe la societo. La repertuaro de la grupo pligrandiĝas, kiel ankaŭ la lerteco de la kantistoj.

*

Tre solene festis societo «Maksim Gorkij» la tagon de Lenin. Ĝi okazis en la salonego de la telefona centralo. Ĝin partoprenis per belarta kantado la Ĥoro de la Sofiaj Junulinoj ĉe Kulturdomo «Slavjanska beseda», nombranta 70 aninojn sub la gvido de la lerta dirigento Georgi Radev. Partoprenis ankaŭ per belegaj popolaj dancoj la dancista grupo ĉe la fabriko «Jordanka Nikolova», gvidata de Ljuben Markovski. La ĥoro kaj la dancista grupo estas premiitaj ĉe diversaj festivaloj kaj konkursoj kaj fervore lernas Esperanton.



Belegan spektaklon esperantlingvan faris la teatro «Trudov front» prezentante la sovetan familian komedion «La tago de la virino», esperantigitan de la artistoj mem. Ĉe la solena vespero okaze de la Unua de majo, partoprenis la kantista grupo ĉe societo «Maksim Gorkij» sub la gvido de Irina Kijova. Oni kantis por unua fojo la belan kanton «Unua maj» tradukitan de Stefan Kiraĝiev.

Stefan Kadiev

Bankja. Kies vigla koro ne vibras ĝoje antaŭ la laborfesto Unua de Majo? Kiu konscia homo ne preparas sin por la internacia tago de laboro?

Societo «Solidareco» en Bankja ankaŭ ne postrestis. Kelkajn tagojn antaŭ la festo en la vilaĝo aperis esperantaj sloganoj: «Unuamajan saluton al ĉiuj pacbatalantoj!», «Vivu la paco en la tuta mondo!» k. a. kun verda stelo en la komenco. En la klubejo de BKP altiris atenton la vitrino kun esperanta unuamaja ornamo.

Dum la festo la membroj de la societo manifestaciis en aparta kolono de gelernantoj kaj gecivitanoj kun verda flago kaj granda esperantlingva slogano «Vivu la Unua de majoj!», kantante «Kamaradan kanton»!

D. Ĥristova

Noto de la Redakcio. Estas bona kaj gratulinda la entuziasmo kaj la agado de la samideanoj el Bankja. Tamen en tiaj okazoj pli efika estas nia propagando ne per ĝeneralaj sloganoj skribitaj en Esperanto, sed per poresperantaj sloganoj en bulgara lingvo. Ekzemple en tiu okazo estus efikaj tiaj sloganoj: «Per Esperanto ni plifortigas la internacian solidarecon» aŭ «Per Esperanto ni akiras amikojn de nia popolo en eksterlando» kaj aliaj similaj. Nun la sloganoj de la esperantistoj en Bankja restis nekompreneblaj.

V r a c a. Antaŭ nelonge ĉe la Esperanto-societo en la urbo estis organizita junulara sekcio. En ĝi membras precipe lernantoj — esperantistoj en ĉiuj mezaj lernejoj en la urbo. La sekcio akceptis planon por sia kulturkleriga agado. Kiel unua montriĝo estas la organizita arta spektaklo en Esperanto. Pli ol 150 lernantoj, kunvenintaj en la salono de la teksa lernejo, atente aŭskultis la recititajn en Esperanto versaĵojn. La lernantino Vio-

leta Stajkova el teksa lernejo plej bone deklamis la versaĵon «Moskvo» de Ĥristo Smirnenski.

Post la spektaklo okazis komuna amuzajo. La esperantistoj sukcesis gajni la korojn de ĉiuj ĉeestantoj, kiuj volonte partoprenos en la E-kursoj, malfermotaj de la sekcio en la komenco de la nova lernjaro.

Enjo Daskalov

Drjanovo. La 11-an de aprilo dek kvar laboristoj kaj oficistoj el urbo Drjanovo fondis novan E-societon. La societo portas la nomon de ilia samurbano kaj bona esperantisto pereinta por la libero dum 1943 jaro — Ivan Vladkov.

La fondkunvenon ĉeestis ankaŭ k-do Neno Janev el Gabrovo, kiu donis utilajn konsilojn al la novaj societanoj.

En la estararo de la societo oni elektis la kamaradojn: N. Nejkov, G. Manev kaj K. Jordanov. La unuaj taskoj de la nova societo estas pligrandigo de la societa membraro per malfermo de kursoj kaj diskonigo de la ideo pri internacia lingvo inter la loka loĝantaro.

Nejko Nejkov

Ni gratulas la drjanovajn samideanojn kaj bondeziras plenan prosperon al la nova societo. Estas rekomendinde, ke ili firme enpenetru en la laboristajn mediojn de la vagonkonstrua uzino «A. Ĥdanov» en ilia urbo kun la helpo de la aliaj amasaj organizaĵoj kaj se eble de la uzina estraro mem. Kamaradoj, pristudu la sperton de la dimitrovgradaj samideanoj!

Nova Zagora. Hieraŭ finis sian trimonatan laboron la kurso de Esperanto en nia urbo. Pli ol 20 civitanoj kaj lernantoj gvidataj de la instruisto A. Genov ekposedis la internacian lingvon Esperanto. Preskaŭ ĉiuj fariĝis membroj de la loka societo «Edmond Privat» kaj ricevas nian organon. Iuj komencis korespondadi kun en- kaj eksterlandaj samideanoj.

Dank' al la helpo de nia loka legejo kaj la konsiloj de s-ano D. Dobrev, membro de CK de BEA, kiu vizitis nin dum la vintro, ni iom vigliĝis. La novaj verdstelanoj fiere partoprenis la unuamajan feston kaj promesas akompani nin al la 34-a kongreso en Târnovo.

Nova samideano

Ruse. La 6-an de aprilo, sabate posttagmeze subite alvenis en nian klubejon sveda samideano el Stokholmo Helge Akselson, konstrua laboristo, kiu veturis tra nia lando turiste. Grandega estis la ĝojo kaj intereso pri tiu ĉi tiom agrabla subita surprizo por ĉiuj gesocietanoj, malnovaj, novaj gekursanoj kaj gejunuloj.

Dumonatan vojaĝadon per Esperanto tra diversaj mezeŭropaj landoj faris s-ano Akselson kaj speciale en Bulgario li volas vidi per siaj propraj okuloj la veron pri la nova vivo! Post la interkonatiĝo sekvis diversaj demandoj de ambaŭ flankoj celantaj komparon pri la vivo en Svedio kaj Bulgario. La societanoj, invitis la gaston partopreni la venontan tagon la planitan jam ekskursion, pri kio li afable konsentis. Poste la ĉeestintoj kun s-ano Akselson promenis en la urba apuddanuba Parko de la junularo kaj vizitis la pontegon sur Danubo, kiu laŭ lia opinio estas plej granda, kiun vidis ĝis nun.

Dimanĉe matene per aŭtobuso la ekskursantoj feliĉe ĉirkaŭantaj sian novan eksterlandan amikon gaje veturis al la eksterurba arbarparko. Bona vetero, vekiĝanta naturo, kantoj en la arbaro favoris al ni. En tiu ĉi parko multe da uzinoj kaj entreprenoj konstruis por siaj laboristoj 3-etaĝajn ripozdomojn en diversaj arkitekturaj stiloj. Ni montris al s-ano Akselson pli ol 10 tiajn kaj al li tre impresis ĉi tiu grava akiraĵo de la laboristoj en nia lando. Sur danoplaco ĉe unu ripozdomo la gejunuloj demonstraciis antaŭ la gasto bulgarajn rondancojn.

Boris Kavalĝiev

Ruse. La 8-an de majo, dimanĉe, modestan sed ĝojigan solenaĵon aranĝis la juna kursgvidanto-studento Momĉo Momĉev kun siaj gekursanoj el I-a kaj V-a mezlernejoj okaze de la fino de la kurso. Post la raporto de Momĉev pri la sukcesa fino de la kurso kamarado Marinov, sekretario de la loka societo, salutis la gekursanojn. Al plej diligentaj gekursanoj estis disdonitaj donacoj: libroj kaj abonoj por «Bulgara Esperantisto». La donacitoj dankis kaj promesis perfektigi siajn konojn en la lingvo kaj doni sian kontribuon por disvastigado de nia movado. La samideano-gasto el Târnovo invitis la gejunulojn viziti nian 34-an kongreson. Sekvis danca amuzaĵo.

Laŭdinda estas la agado de la junaj kursgvidantoj, kiuj ofertas tempon kaj fortojn por varbi novajn adeptojn por nia kara lingvo Esperanto.

Boris Kavalĝiev

NOMBRO DE LA ALIĜINTOJ AL LA KONGRESO EN TARNOVO ĜIS 11-a DE JUNIO

1. Sofia	112
2. Ruse	39
3. Isparih	27
4. Pazarĝik	25
5. Dimitrovgrad	60
6. Pleven	28
7. Nova Zagora	16
8. Haskovo	16
9. Gabrovo	20
10. Kŭbrat	10
11. Bankja	9
12. Sevlievo	12
13. Asenovgrad	5
14. Vraca	10
15. Kjustendil	4
16. Bjala	3
17. Loveĉ	6
18. Kamenovo, Slivena distr.	3
19. Plovdiv	35
20. Batoŝevo, Gabrova distr.	2
21. Smoljan	2
22. Burgas	2
23. Velingrad	2
24. Varna	21
25. Trjavna	2
26. Ljubimec	3
27. Resen, Târnova distr.	1
28. Belotinci, Mihajlovgrada distr.	1
29. Brezovo, Plovdiva distr.	1
30. Pirdop	1
31. Belogradĉik	1
32. Grudovo	1
33. Vazovgrad	1
34. Sâdievo, Slivena distr.	1
35. Tolbuĥin	16
36. Târnovo	15
kaj aliaj, entute	732

GRAVA KOREKTO EN LA STATUTO

Ĉe la presado de la statuto estas ellasita grava elemento en art. 23 alineo dua. Post la dua frazo oni devas almeti: . . . kaj kontrolo komisiono». Do la tuta frazo devas esti:

То разглежда и приема годишния отчет на ръководството, дава оценка на неговата работа и избира ново ръководство и контролна комисия.

Pro tiu ĉi preseraro iuj societoj ne elektas kontrolan komisionon. Tio ne estas regula. La societoj konsideru la korekton kaj elektu ĉiam al la estraroj kontrolajn komisionojn, kiuj estas necesa organo por ĉiu organizaĵo.



DISTRIKTA JUNULARA RENKONTIĜO EN RUSE

La 2-an de majo 1959 laŭ iniciato de la junulara grupo «Flamo» ĉe la E-societo en Ruse estis organizita distrikta junulara renkontiĝo, en kiu partoprenis gejunuloj el multaj urboj kaj vilaĝoj de la distriktoj de Ruse, Razgrad kaj Silistra.

La utilo de similaj renkontoj estas senduba kaj ĉi jare la junaj geesperantistoj el Ruse denove invitis siajn gesamideanojn el la proksimaj regionoj por la dua distrikta junulara renkontiĝo.

La 2-an de majo matene la esperantista klubo estis plenplena kun entuziasmaj pachtalantoj. Alvenis junuloj de Târnovo, Kubrat, Bjala k.a. Siajn reprezentantojn sendis ankaŭ la junaj geesperantistoj el la lernejoj kaj uzinoj en la urbo.

La prezidanto de la loka junulara grupo «Flamo» en belsona Esperanto salutis la gastojn kaj bondeziris sukcesan interesanĝon de organiza kaj faka sperto al ĉiuj ĉeestantoj. Post la malfermo ĉiuj grupe vizitis la ponton de la amikeco.

Posttagmeze la laboro de la renkontiĝo daŭris en la bela eksterurba parko «Lipnik». Unu post alia la junuloj rakontis pri sia varia sperto en la organizo de junularaj E-grupoj, en la laboro kun la laborista kaj lerneja junularo, en iliaj internaciaj rilatoj, korespondado kaj pachtalo, en la produkta laboro kaj partopreno en la avangardaj kom-somolaj laborbrigadoj. Fine, la ĉeestantaj junaj laboristoj, terkulturistoj, oficistoj, studentoj kaj lernantoj decidis konkuri por pli amasa kaj pli organizita partopreno en la 34-a kongreso en Târnovo kaj en la tiea tutlanda junulara konferenco. Ili sendis alvokon al la Junulara Fakto ĉe CK de BEA kaj al LKK en Târnovo proponante ke dum la kongreso oni plantu simbolsigne arbon de la junulara amikeco, kun tero alportita de la tomboj de la junaj herooj falintaj por la libero kaj de la aliaj reprezentitaj landoj.

Jordan Dimitrov

NI FORMIS JUNULARAN GRUPON

En la E-societo «Sukceso» en urbo Vraca membras multaj gejunuloj — gelernantoj. Laŭ iniciato de la prezidanto de la societo la konata veterano de la E-movado en Vraca R. Triĉkov estis fondita junulara grupo. En speciala kunveno ni elektis estraron de la grupo kaj aprobis planon por ĝia estonta laboro. La plano antaŭvidas ĉiumonatajn kunvenojn je variaj temoj, preparon de propaganda materialoj, malfermon de novaj kursoj, varbadon de novaj membroj, organizon de kantista grupeto kaj aliajn kulturkleriĝajn, organizajn kaj turistajn iniciatojn. Ĉiuj ĉeestantoj kun ĝojo promesis labori ankoraŭ pli obstine por la prospero de la ŝatata junulara grupo.

Enjo Daskalov

La redakcio gratulas la junajn esperantistojn el Vraca pri ilia sukceso kaj kun ĝojo akceptos novaĵojn pri ilia vigla estonta agado.

NIA NOTO

En la aprila numero de «Studento» — organo de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo-aperis kritikaj notoj de la Sofia Studenta E-Rondo pri la menciita bulteno kaj korespondado el la vivo de la sofiaj studentoj. La pridiskutado de niaj periodaĵoj povas esti nur utila por la antaŭenmarŝo de la movado.

Ni atentigas la bulgaran esperantistan gestudentaron helpi la redaktoron de «Studento» por plibonigo kaj plivariigo de la bulteno sendante ĉu novaĵojn el la vivo de iliaj grupoj, ĉu proprajn studojn aŭ eseetojn.

Adreso: S-ro V. Sadler, Dept. of Phonetics, Unievrsity College, London, Gower Street London W. C. 1, Britlando.

VARBAN RUSINOV GENĈEV



En la glora kaj heroa batalo kontraŭ la faŝismo partoprenis la plej kuraĝaj kaj fidelaj filoj kaj filinoj de la popolo. En tiu batalo konsiderindan rolon okupis ankaŭ la bulgaraj esperantistoj. Unu el la plej aktivaj batalantoj kontraŭ la faŝismo, heroe pereinta en interbatalo kun la faŝistaj hordoj je la 30-a de marto 1944 jaro apud vilaĝo Carski izvor, Târnova distr., estis nia kara kaj neforgesebla kamarado Vârbănescu Rusinov Genchev.

Vârbănescu Genchev naskiĝis je la 26-a de julio 1918 en v. Careva livada, nun Vârbănescu, distr. de Gabrovo, en progresema familio. Jam kiel junulo li montras grandan sciemon kaj amon al la sciencoj. Kiel lernanto en la knaba gimnazio de Târnovo Vârbănescu

Genchev per sia laboremo kaj obstineco, per sia gaja karaktero kaj bonaj kamaradecaj rilatoj gajnis la estimon kaj la amon de la lernantoj kaj la instruistoj. Li estis distingulo de la klaso. Kiel progresema junulo sub la influo de la Komsomolo li obstine legis progreseman kaj marks-leninisman literaturon kaj formis sian komunistan mondkoncepton. Malgraŭ la kruelega teroro kaj la faŝista obskureco Vârbănescu Genchev trovis laŭlegajn formojn kaj manierojn por propagandi la progresemajn ideojn inter la cetera lernanta junularo. Li estis aktiva membro de abstinentula societo kaj faris multajn referaĵojn kun progresiva karaktero. Li estis unu el la gvidantoj de la lernanta kooperativo kaj ankaŭ unu el la plej bonaj stenografoj en la gimnazio. Aparte aktiva estis lia agado en la esperantista societo. Vârbănescu Genchev lernis obstine kaj sisteme la internacian lingvon Esperanto. Li korespondis kun esperantistoj el multaj landoj, ricevadis Esperanto-materiaĵojn el batalanta Hispanio — la gazeton «Popola fronto», el Ĉinio — «Orienta kuriero», el Sovetunio, Nederlando kaj aliaj. Li staris kaj konfirmiĝis kiel plej bona esperantisto inter la lernantoj en Târnovo, kiu libere parolis kaj skribis esperantlingve. Por li tamen ne sufiĉis, ke nur li mem scipovu la lingvon kaj utiligu ĝin. Konsekvence internaciisto kaj entuziasma pioniro de la disvastigo de la internacia lingvo, li organizis kursojn kaj instruis kiel lektoro en Esperanto multajn junulojn el la gimnazioj de Târnovo. La kursoj de Esperanto, kiujn gvidis Vârbănescu Genchev, estis vizitataj amase kaj volonte, ĉar li scipovis simple kaj pervide

klarigi, instrui la materialon. Li estis atenta kaj sprita, konvinka kaj postulema en la laboro. Li havis bonegajn kvalitojn de amasgvidanto kaj ĉiuj sentis lin kiel proksiman amikon kaj kamaradon.

Post la fino de la gimnazio Vârban Genĉev, kiel studento de medicino, daŭrigis pli aktive partopreni en la batalo kontraŭ la faŝismo. Li estis unu el la gvidantoj de la eksterleĝaj kaj laŭleĝaj studentaj organizaĵoj, daŭrigis aktive partopreni en la esperantista movado.

Kiam laŭ alvoko de la komunista partio li ekiris la malfacilan sed gloran vojon, samideano Vârban Genĉev utiligis ĉiujn siajn konojn kaj sperton por organizado de la popolo en kontraŭfaŝista batalo. Li estiĝis membro de la distrikta partia komitato en Gorna Orjahovica kaj estis sendita kiel politika komisaro kaj kuracisto de Gorno-Orjahovica-a taĉmento. Vârban Genĉev estis modelo de vera komunisto, kiu donas ekzemplon en ĉio, kiu per granda obstino kaj trankvileco venkis la malfacilaĵojn kaj la mankojn de la partizana vivo. Ĉiam vigla, en la plej malfacilaj momentoj per sia gaja karaktero kaj

atenta rilato al siaj kamaradoj, per sia konvinka parolo instigis la vigan spiriton de la partizanoj. Estante bonega komunisto kaj batalanto, li plenumis ĝis la fino sian devon. Ĉirkaŭita apud v. Carski izvor de faŝista polico kaj armeo li kune kun sia kamarado kontraŭbatalis ĝis la lasta kuglo kaj pereis heroe por la afero de la Partio, por la libero de la popolo. La hela figuro de nia kamarado d-ro Vârban Genĉev devas inspiri nun la junan generacion kaj nian popolon en la batalo por konstruo de socialismo, en la batalo por paco inter la popoloj. Ni estas fieraj, ke en niaj vicoj, en la vicoj de la esperantistoj estis tiaj bonegaj kamaradoj, tiaj herooj kiel d-ro Vârban Genĉev.

Nun la afero, por kiu pereis kamarado Vârban Genĉev kaj multaj aliaj batalantoj, venkas ne nur en nia lando. Ĝi rikoltas abundajn sukcesojn en la tuta mondo. Por la sukceso de tiu grandega afero, la afero de la paco kaj la socialismo devas doni ĉiujn siajn fortojn ankaŭ la bulgara esperantistaro.

Sava Dâlbokov

Unua vicministro de la financoj

ESPERANTISTA GEOLOGA KLUBO

En Varsovio fondiĝis Esperantista Geologa Klubo. Ĝi interesiĝas pri diversaj problemoj de geologio kaj ankaŭ pri la vivo de la geologoj kaj terboristoj en la tuta mondo.

Salutoj, bondeziroj, leteroj kaj poŝtkartoj de eksterlandaj geologoj — esperantistoj tre helpas al la afero de la nova klubo.

Adreso: Pola Esperantista Geologa Klubo, Varsovio 10, str. Jasna 6, Pollando.

PRI LA ABONIGADO AL BULGARA ESPERANTISTO

Multaj samideanoj demandas, ĉu oni povas aboni ankoraŭ al «Bulgara esperantisto» kaj ĉu la novaj abonantoj ricevos la aperintajn n-rojn. Jes, la societoj kaj la apartaj aktivuloj devas daŭrigi la abonigadon al nia presorgano. La novaj abonantoj ricevos ĉiujn aperintajn n-rojn. Iuj societoj subtaksas la signifon de BE. Ekzistas eĉ estraranoj kiuj ne ricevas ĝin. Ĉu ili ne hontos en la kongreso?

Târnovo, la urbo de nia 34-a kongreso, estas unika en Eŭropo laŭ sia situo. La urbo estas en montara amfiteatro, ĉirkaŭata de ĉiuj flankoj de krutaroj, kiuj leviĝas pli ol dudek metrojn super la rivero Jantra.

Târnovo estas malnova bulgara ĉefurbo. Unuafoje ĝi estas menciata ĉirkaŭ la jaro 1185, kiam la nobeloj Asen kaj Petâr levis la bulgaran popolon en ribelo kontraŭ Bizanco. Ili fondis la Duan Bulgaran Regnon. En 1393 Târnovo estis sieĝita de potenca turka armeo. Post trimonata heroo rezisto ĝi estis konkerita kaj rabata. Preskaŭ 500 jarojn la vivo en Târnovo pasis sub la signo de la turka regado. Târnovanoj partoprenis en kvin ribeloj kontraŭ la turkaj subpremanoj.

Post la liberiĝo de Bulgario el la turka jugo en 1878 post la rusa-turka milito Târnovo fariĝis ĝia unua ĉefurbo. Tie ĉi kunsidis la Ŝtatfonda Parlamento, kiu donis al la lando konstitucion. Târnovo ludis grandan rolon en la plej nova historio de Bulgario kiel unua fariĝo de la progresemaj ideoj de la fama bulgara sociaganto Dimitr Blagoev.

La antikva urbo situas sur ambaŭ nealireblaj montetoj Carevec kaj Tra-




pezica. Jantra, serpentumanta ĉirkaŭ la urbo en la formo de litero S kun treege proksimiĝintaj ekstremoj, prezentis naturan remparon kaj kroman baron al la nealireblaj montetoj. Sur Carevec troviĝis la palacoj de la reĝo kaj de la patriarĥo.

Laŭ nealirebleco la nobela kvartalo Trapezica konkuras la monteton Carevec, sed havas malpli altan kaj pli ebenan spinon. Tie ĉi oni malkovris 16 preĝejojn nomatajn nobelaj. Ĉe la piedoj inter ambaŭ montetoj travivis jarcentojn la du historiaj preĝejoj — Sanktaj 40 Martiroj kaj Sankta Dimitro. Dum la Dua Bulgara Regno Târnovo estis grava kultura centro.

Hodiaŭ la urbo estas plibeligata. En ĝi estas konstruataj multaj sociaj konstruaĵoj kaj loĝejoj. En 1955 la urbo estis proklamita muzea rezervato. Unu el la plej gravaj karakterizaĵoj de urbo Târnovo estas ties amfiteatre situantaj konstruaĵoj.

La Muzeo de Târnovo konservas ĉirkaŭ kvin mil maloftajn objektojn de la praĥistoria kaj la sklava periodo, de la unua kaj la dua bulgara regno, de la renesanco k. a.





La gastamo de târnovanoj estas fame konata. La hoteloj estas priser-vataj de atentema personaro. Proksi-me al Târnovo troviĝas monaĥejo «Sankta Transfiguracio» kaj vilaĝo «Arbanasi» kun interesaj vidindaĵoj.

Târnovo estas ligita ne nur kun la historio de la bulgara popolo, sed ĝi estas ankaŭ lulilo de la esperantismo. Komencon de unu tre vigla esperanta vivo metis la apotekisto Nikola Zlatev. Je liaj elspezoj dum longa tempo estis presata la esperanta revuo «Lumo». En vilaĝo Dolna Orjaĥovica laboris la instruisto Ĥristo Popov. Poste en Târnovo aperis nova espe-rantista generacio: Ilija Zlatev, la fi-lo de Nikola Zlatev, la fratoj Nikola, Georgi kaj Ĥristo Haralambev(ov), Paskal Paskalev. En 1902 la esperan-tista societo «Fulmo» estis ŝanĝita en «Lumo». Post sia reveno el Petrograd (nun Leningrad) Ĥristo Ĥaralam-bev, kiu estis en la komenco kontraŭulo de Esperanto, baldaŭ fariĝis entuziasmigita esperantisto. Li eka-gis energie, fariĝis animo de la loka grupo «Lumo» kaj donis al ĝi fortan puŝon. En 1906 li komencis redakti kaj eldoni ogranon de la loka gru-po — la gazeto «Lumo». Aliaj age-maj esperantistoj en Târnovo tiam

estis Haralampi Bâĉvarov (aŭtoro de Esperanto-bulgara vortaro), Georgi Penĉev, Mladen Georgiev, Ĥristo G. Trikjakin (nun en Sofia), Stilijan Kojĉev k. a.

En 1907 en Târnovo okazis la unua bulgara esperantista kongreso, kiu fondis Bulgaran Esperantistan Li-gon. «Lumo» fariĝis oficiala organo de la ligo. En Târnovo Ĥristo Ĥara-lambev fondis bibliotekon «Esperan-to-mondo», kies unua numero es-tis bulgara traduko de la raporto de Ernest Naville pri Esperanto kaj la dua numero — la ruĝa broŝuro (pro-paganda mallonga gramatiko) en bulgara lingvo.

En Târnovo okazis en 1923 la deka bulgara esperantista kongreso, kiun ĉeestis rumanaj esperantistoj (Hen-riko Fiŝer, Andreo Ĉe, Tiberiu Mora-riu, Francisko Kiŝ). Inĝ. E. Balaŝ, ano de la Rumana Senato, legis refe-raĵon je temo «La vojo al la paco». En 1936, dek tri jarojn post la unua kongreso, okazis la dudek tria bulga-ra esperantista kongreso.

Kaj nun denove en la glora urbo Târnovo okazos la 34-a kongreso, kiun ĉeestos ne nur multaj bulgaraj esperantistoj, sed ankaŭ multaj fremdlandaj gastoj. La esperantistoj de Târnovo, kiuj gardas la tradiciojn de la unuaj esperantaj pioniroj, inde renkontos la gastojn, montros al ili la mirindajn beladojn de la malnova ĉefurbo kaj sukcesos organizi tian atmosferon, en kiu la delegitoj de nia movado havos eblecon dediĉi ĉi-ujn siajn kapablojn por fruktodona laboro.

Ni esperu, ke nia 34-a kongreso dank' al la sindona kaj fervora laboro de la nunaj nelacigeblaj esperantaj agantoj transformiĝos en brilan ma-nifestacion de ĉiuj esperantistoj — bulgaraj kaj fremdlandaj, unuigitaj en la batalo por paco kaj progreso!

Ivan Sarafov

POR LA ESPERANTO-DOMO EN SOFIO

La decido de BEA disvastigi markon-brikon por konstruo de Esperanto-domo entuziasmigis la esperantistojn en la tuta lando. Estas fervoraj samideanoj, kiuj solaj disvendis markojn por centoj da levoj. Ekzemple Lazar Mladenov el Sofio vendis markojn por pli ol 2500 lv., Petăr Bučevinov el Samokov — por 600, Asen Grigorov el Sofio — por 1500 levoj, Dimitr Ivanov el Plovdiv — por pli ol 700. La fama bulgara verkisto Georgi Karaslavov, ĝenerala sekretario de la Asocio de la Bulgaraj Verkistoj, aĉetis markojn por 1,000 levoj.

Tiu sindonemo de la bulgaraj esperantistoj admirigas la eksterlandajn samideanojn. Ĝi inspiris ankaŭ la sovetan Esperanto-poeton **Petro Poliŝĉuk** kaj rezulte aperis:

VERSAĴO PRI «BRIKOJ»

Sur koverto gluas mi la «brikon»,
kvazaŭ ĝin mi metas en la grundon,
kvazaŭ ĝi en konstruaĵ' komplika
estas signo de l'estim' profunda.

Kaj gluante gladas mi la «brikon»,
kvazaŭ mi premegas viajn manojn,
kvazaŭ kune sidas ni, amikoj,
en feliĉa rondo samideana.

Inter ni ja kuŝas vasta spaco,
sed por ni la spaco ne ekzistas!

Flugu, flugu, «brikoj» de la Paco,
por Bulgara Dom' Esperantista!

Eble iam venos temp' benita —
vi gastigos min en domo via,
kies muroj havas mian ŝviton,
kaj la ardon de laboro mia.

Dume do, karegaj geamikoj,
nepre «brikojn» sur kovertojn gluu!
Vere, estas ĉi modestaj «brikoj»
por la granda celo kontribuo.

Petro Poliŝĉuk

SPIRITO LIMOJN SPITAS

La soveta ministro-prezidanto vizitis multajn landojn de Eŭropo, Ameriko kaj Azio. Ĉie la popoloj lin akklamis kiel grandegan apostolon de la paco kaj la feliĉo por la tuta homaro. Li estiĝis simbolo de la ideo por tuthomara harmonio, pri kiu revis Zamenhof kaj pri kiu batalas ĉiuj konsekvencaj esperantistoj. Esprimon de la admiro al tiu porpaca agado de Ĥruŝĉov donas nia nederlanda samideano en la sube presita versaĵo.


Ĥruŝĉov ne vizitis ĉiun landon . . .
ĉar la registaroj ne deziras,
ke la Paco, ĉien iru . . .
«Li nur faras propagandon!».

Jes, li propagandon faras!
Ordinara la popolo
lin ja vidas apostolo. . .
Al milit' li vojon baras!

Ĥruŝĉov ĉiun landon ne vizitas . . .
Ĉar la registaroj morte timas —
la popoloj lin estimas!
Sed. . . spirito limojn spitas . . .

Jes! Spirito limojn spitos:
La popol' por pac' batalos!
Registar' kontraŭa falos!
Pacon tuta mond' profitos!

J. Schoon



KIEL LA VERDSTELANINO

La esperantisto Ŝiŝko deziris pasie, ke ankaŭ ŝia edzino parolu Esperanton. Li faris ĉion eblan por konvinki ŝin lerni kun li la lingvon. Sed ŝi obstinis kaj malemis fari tion.

Tamen la esperantisto Ŝiŝko ne disiluziiĝis. Li daŭre serĉadis manieron inklinigi sian edzinon eklerni Esperanton. Sed vane. La edzino ĉiam respondis, ke ŝi ne kapablas lerni fremdan lingvon, ke ne havas liberan tempon ktp.

Sed iun vesperon la edzino de la esperantisto Ŝiŝko devis englutigi amaraĵon. La okazintaĵo ne estis ordinara kaj laŭ la kutimoj de ŝia edzo. La lasta revenis hejmen ne sola, sed akompanita de unu virino, iomete pli juna ol ŝi kaj kiu ankaŭ surportis verdan stelon kiel ŝia edzo.

La esperantisto Ŝiŝko prezentis la verdstelaninon al sia edzino kaj ili ambaŭ longe babilis. La edzino de Ŝiŝko bedaŭregis, ke ŝi ne scipovas paroli Esperanton por povi kompreni kion lia edzo estis parolanta kun la alia virino.

La sekvintan matenon la edzino de la esperantisto Ŝiŝko diris:

— Ŝiŝko, mi volas demandi vin pri io.

— Diru, kara.

— Ĉu Esperanto estas facila?

— Nu, certe, vi jam scias tion. Sed kial vi demandas min?

— Ĉar mi volas lerni kaj paroli ĝin kiel... ŝi, la verdstelanino kiu hieraŭ vespere estis ĉe ni...

M i k a e l o

GAJNO KAJ PERDO

Du esperantistoj vetis disvendi po 250 brikoj por la Esperanto-domo en Sofio. Kiu ne sukcesos disvendi la 250 brikojn ĝis la difinita limtempo, pagos al la alia la diferencon.

Post unu monato la du vetintoj renkontiĝis por vidi kiu gajnas. Evidentiĝis, ke unu disvendis ne 250, sed 350 brikojn, dum la alia disvendis nur 150 brikojn.

— Kial do vi disvendis 100 brikojn pli? — demandis la dua esperantisto.

— Por gajni kion vi perdos — respondis ruze la unua.

M i k a e l o

MADE IN USA

Du knaboj volis flugi al la luno kaj faris raketon el lado.

Tiam venis al ili tria knabo kaj ride diris al ili:

— Vi volas flugi al la luno, sed vi ne atingos ĝin.

— Kial do? — demandis ambaŭ knaboj.

— Ĉar via raketo diskrevos en la aero. Vidu kio estas skribita ĉi tie!

Kaj ili vidis, ke sur unu anguleto de la raketo estas surskribita: «Made in USA».

BONA KONSILO

— Ĉu vi dormis je malfermita fenestro, kiel mi rekomendis al vi.

— Jes, kamarado doktoro.

— Kaj ĉu malaperis jam via kapdoloro?

— Tute ne, k-do doktoro. Malaperis nur mia nova kostumo.

K A T A S A Ĝ E C O

Nu, dankon al gazetoj stultaj,
kiam bulgaron ni invitis,
(el «ruĝa» lando!) fakte multaj
iom ektimis aŭ hezitis.

«Ĉu bolŝeviko? Ĉu sovaĝa?»
«Mi sentas en la sango froston!»
«Ĉu estas li demonvizaĝa?»
«Ĉu la bulgaro havas voston?»

(Esperantistoj pli sagacaj
estas. Malamo ĉi ne nubis.
Tamen, eĉ batalantoj pacaj
eble momente iom dubis).

Jen venas Murgin, klera, kara,
kultura, li eksidis ĉe ni . . .
«Li ne aspektas tre barbara . . .»
«Mi povas bone lin kompreni . . .»

Sed hezitetoj restis. Oni
ne certis . . . ĝis la eminenta
kato eksidis, kaj ronroni
komencis, tie plenkontenta.

Homo bulgara, kat' siama,
bona ekzemplo por la mondo!



Dum la pasinta jaro veturis Britlandon
s-ano Canko Murgin, membro de CK de
BEA. Li vizitis diversajn urbojn kaj renkon-
tiĝis kun multaj samideanoj. Ĉie s-ano Mur-
gin estis bone akceptata.



Nacioj en kompreno ama
vivu en familia rondo!

Bildon pri paca kunvivado
mi faris tuj. Kaj jen vi vidas:
jen mia kato, sen persvado,
sur inda sin' de Murgin sidas.

Ni ĉiuj penu same saĝi.
Estas sur ter' sufiĉa spaco
por ke ni povu malsovaĝi
kaj vivi home kaj en paco.

MARJORIE BOULTON

ĈU EFEKTIVE ESPERANTO BEZONAS NOVAJN VORTOJN?

(daŭrigo de n-ro 4)

Ordinare la plimulto de la aktiva esperantistaro konsentas pri uzado de novaj vortoj, sed kondiĉe, ke oni evitu **necesajn neologismojn**. Tamen kio estas necesaj neologismoj?

Ĉu la neologismoj ekzemple **razeno**, **gazono**, **grapolo**, **traŭbo**, **pojno**, **pigra**, **obskura** estas necesaj kaj sekve evitendaj?

Ni pritraktu komence la du unuajn vortojn — **razeno** kaj **gazono**.

Razeno laŭ PV signifas: ĝardenaj flegataj herbotapiŝoj; herbetaro, herbetoj. (Bulgarlingve: zelena ploŝt).

Gazono laŭ Suplemento de PV (1954) signifas: zorge kultivata herbejo. (Bulgarlingve: zelena ploŝt. Por la bulgarlingva literatura oni uzas **herbkampo**.)

La du supraj neologismoj laŭ ni estas preskaŭ samsignifaj, sinonimaj; la bulgarlingva signifo de ambaŭ ja estas: zelena ploŝt. Ili diferencas nur etimologie — «razeno» devenas el germana lingvo, dum «gazono» — el franca. Pro tio efektive unu el ili povus esti konsiderata necesaj kaj evitenda.

Sed, ĉu tiel statas pri la dua neologisma paro: **grapolo** — **traŭbo**?

Grapolo laŭ PV signifas: kunaĵo da floroj aŭ fruktoj pendantaj laŭlonge kaj ĉirkaŭflanke de komuna trunketo: grapolo de vinbero, grapolo de lilako; sinonimo de **beraro** (bulgarlingve: **grozd**).

Traŭbo laŭ Suplemento de PV signifas: grapolo.

Sekve ankaŭ tiu ĉi dua neologismo estas egalsignifa kaj do estas necesaj. Kaj vere d-ro **P. Neergard**, agronomia fakulo kaj esperantologo (Esperantologio, n-ro 4, p. 250, 1955) preferas **grapolo** ol **traŭbo**. Tamen, aldone li tuj notas, ke **traŭbo** fariĝis pli «vinberoj» ol «vinberaro». Do se ni plue konsideras ambaŭ neologismojn por (vin) beraro, evidente unu el la du estas necesaj kaj evitenda (kaj probable ĝi estus «traŭbo»). Tamen se ni ekkonsiderus **traŭbo** por vinberoj, tiam ĝi jam ne estus samsignifa kaj sinonimo de **grapolo** kaj fakte fariĝos uzinda.

Pojno signifas: manradiko. Simpla kaj mallonga nova radiko anstataŭ la pli longa fundamenta kunmetaĵo. Kaj similaj neologismoj ekzistas ankoraŭ pli — **agro** (grenkampo), **ascendi** (supreniri), **domini** (superregi), **polmo** (manplato), **majusklo** (ĉeflitero), **nupto** (edziĝofesto), **ŝutro** (fenestrokovrilo) ktp.

Ĉu ili havas ekzistojn? — En la primitiva lingvo certe ne, tamen ĉe pli delikata nuanciĝo en la literatura lingvo — **jes!**

Pigra estas Zamenhofa radiko kaj signifas: **maldiligenta**. Kaj **obskura** signifas: **malluma**. Tre multaj estas tiuj ĉi neologismoj por t. n. «mal» — vortoj: **dura** (malmola), **febla** (malforta), **frida** (malvarma), **lanta** (malrapida), **magra** (malgrasa), **trista** (malgaja), **turpa** (malbela), ktp.

Nia unua konsidero tie ĉi estas, ke Zamenhofa radiko ne povas esti neologismo. Due: la «mal»-vortoj meritas esti provataj en la praktiko. Ni devas memori, ke ne ĉiuj **antonimoj** (vortoj rekte kontraŭaj de aliaj) esprimiĝas fundamente ĉiam per «mal» — formaĵo! Ekzemple:

blanka — **nigra** (sed ne «malblanka»),
trovi — **perdi** (sed ne «mal trovi»),
memori — **forgesi** (sed ne «malmemori»),
nordo — **sudo** (sed ne «malnordo»),
oriento — **okcidento** (sed ne «maloriento») ktp.

Do rigora limo inter memstara vortradiko por antonimo kaj «mal» — formaĵo ne ekzistas eĉ en la Fundamento de Esperanto. Sekve nur la praktiko finfine decidos pri ties akcepto aŭ malakcepto por la ĉiutaga lingvo.

Nun ni vidu, kion instruas la **moderna ĝenerala lingvistiko** pri neologismoj.

Akademiano **Vladimir Georgiev** kaj docento **Ivan Duridanov** en sia lastatempa universitata lernolibro pri «Lingvoscienco» (Sofia, 1959, pĝ. 150—151) skribas:

«En la vortaro de lingvo ni observas konstantajn ŝanĝiĝojn. La bazaj procesoj ĉe tiuj ŝanĝiĝoj estas du: **ekapero** de novaj vortoj kaj **formortado** (defalado) de malnoviĝintaj vortoj. La formiĝado kaj akceptado de novaj vortoj estas la ĉefa, baza procezo en la evoluo de la vortaro de ĉiu lingvo».

Do la vortaro estas unu el la plej ŝanĝeblaj partoj de lingvo. Tamen la lingvoscienculoj delonge konstatis, ke certaj vortoj en la vortaro konsisto estas uzataj dum tre longa tempo, ke ili estas tre rezistemaj kaj ne tre facile ŝanĝiĝas. Tio rilatas al iuj kategorioj de vortoj, kiel la nomoj de korpopartoj (**okulo**, **orelo**, **nazo**), signovortoj de parenceco (**frato**, **fratino**, **filo**, **filino**), numeraloj (**du**, **tri**, **kvar**, **kvin**...) k. a. Tiu ĉi fakto estas plej bone elmontrita en la verko Stalin'a pri la problemoj de l'lingvoscienco.

Stalin klare diferencigis la rezisteman parton en la vortara konsisto de la lingvo, kiun li nomis baza leksika fonduso: «La ĉefaĵo en la vortara konsisto de la lingvo — li skribas — estas la baza leksika fonduso, kie enestas ankaŭ ĉiuj radikvortoj kiel kerno. Ĝi estas konsiderinde malpli ampleksa ol la vortara konsisto de la lingvo, tamen ekzistas neordinare longe en la daŭro de jarcentoj kaj donas al la lingvo bazon por formiĝi novaj vortoj». La vortoj, apartenantaj al la baza leksika fonduso, havas komunpopolan karakteron, t. e. ili estas sciataj de la tuta popolo kaj estas uzataj tre ofte, krome ili servas por formiĝo de multaj derivaĵoj kaj ordinare estas hereditaj el tre antikva tempo. Sekve la ĉefaj distingiloj de tiuj ĉi vortoj estas: ofta uzo, vortproduktado kaj antikveco.

Iuj lingvoscienculoj provis difini la vortojn de la baza leksika fonduso; ili elmontras, ke ilia nombro estas ĉirkaŭ 1500—2000. El tio evidentiĝas, kiom konsiderinde malpli granda estas la baza leksika fonduso en la kadroj de vortara konsisto de la lingvo.

La principo, konforme al kiuj okazas la alprenado de novaj vortoj en Esperanto, laŭ d-ro K. Kalocsay (Enciklopedio de Esperanto, vol. I. 1933) estas la jenaj:

1. Eviti, ĉe ofte uzataj vortoj pezajn vortkunmetojn (piedpremi—treti; falpaŝiĝi—stambli; malsupreniri — descendi; vizaĝŝmiraĵo — ŝminko).

2. Distingi nuancojn (fali kaj sinki; jelpi kaj boji; langvoro kaj laco; ŝturmi kaj ataki).

3. Signi ideojn, esprimeblajn nur per pluraj vortoj (novalo — provizore nekulturata plugtero; stalisto — akcesora rolulo; kontempli — longe kaj medite rigardi; baŭmi — stariĝi sur la postaj piedoj).

4. Anstataŭigi ĉe ofte uzataj vortoj kunmetojn (stulta — malsprita; kvereli — malpaci; efemera — maldaŭra; aflikti — malĝoigi; kompleksa — malsimpla; humida — malseketa; rara — malofta; trista — malgaja; dura — malbona; milda — malsovaĝa).

5. Simpligi pseŭdosufiksajn vortojn (apelacio — apeli; situacio — situo; dekoracio — dekoro; federacio — federi; erudicio — erudi; erupcio — erupti; proskripcio — proskribi).

6. Kvankam ĝis nun nepraktikata, eble foje irota vojo estus la memstarigo de kelkaj pseŭdoafiksoj. Neergaard proponas ekzemple la sufikson **ik** por signi profesion (danciko, ĝardeniko, ĵurnaliko). Same oni povus el la vortoj preludo, preteksto, preskribi gajni la prefikson **pre** por diri prediro, prevido. El groteska, fosforeski, arabesko oni povus gajni la sufikson **esk** (japaneska, virineska). Oni povas fari el malgraŭ

la prepozicion **graŭ** (laŭ la volo, por la bono de . . .) Sed tio estas vere la «muziko de estonteco».

7. Krome, per la plivastiĝo de Esperanto, oni certe pli kaj pli sentos la neceson de familiaraj vortoj, el kiuj oni jam proponis kelkajn en la Parnasa Gvidlibro (kaputa — rompiĝinta, ruiniĝinta; fatraso — aĉularo; trampo — ĉifona malzorgita ullo; paŭti — malkontente silentadi; mungi — nazpurigi; maroto — amata ĉevaleta).

Konklude al la titole metita demando: «Ĉu Esperanto efektive bezonas novajn vortojn» ni povas respondi nur jese. Esperanto kiel ĉiu «kreskinta» lingvo bezonas novajn vortojn, tamen ne ĉiuj esperantistoj bezonas lerni kaj uzi ĉiujn neologismojn.

Stefan Maserov

TRA LA GAZETARO

«Oteĉestven front», 20. IV. 1960 — informo de Iv. Kirĉev pri la sveda konstrulaboristo Sven Axelson el Stokholmo, kiu gastis al la esperantistoj en Kubrat kaj parolis antaŭ tuturba kunveno.

«Narodna kultura», 30. IV. 1960 — informo pri la forveturo de Bulgara Esperanta Teatro, al Split, por partopreni la festivalon, kiun organizis la jugoslavaj esperantistoj.

«Transportna iskra», 1. V. 1960 — publikigis la leteron de Pan Zigmund el Budapeŝto, per kiu li gratulas la laboristojn de la urba pasaĝertransporto en Sofio okaze de la internacia laborista festo — unua de majo.

«Rabotniĉesko delo», 7. V. 1960 — okaze de la Tago de la radio oni publikigis leteron de Foke Wilson, esperantisto el Svedlando, en kiu li esprimas sian dankon pri la belegaj disaŭdigoj en Esperanto de Radio Sofia kaj substrekas ke estas necesa amikeco inter ĉiuj landoj kaj popoloj, se ni volas la progreson de la mondo.

La esperantistoj en Kemia kombinumo «Stalin» en Dimitrovgrad atingis novan grandan sukceson — ili aperigis numeron unuan de sia organo «Dimitrovgrada esperantisto» kun treege interesa kaj varia enhavo kaj multaj ilustraĵoj. Bedaŭrinde en la ĵurnalo estas allasitaj faktaj, stilaj kaj ortografiaj eraroj. Pro tio ni rekomendas kaj petas la kamaradojn, kiuj respondecas pri la redaktado de la ĵurnalo, antaŭ ol presi la materialojn ilin sendi al la asocio por sperta kaj bonkvalita redaktado kaj korektado kaj tiam doni la gazeton por presado. Tiamaniere ni atingos pli konsiderajn sukcesojn. Malgraŭ tio ni kore gratulas la kamaradojn.

Por pruvi la valoron de Esperanto por la lernejo jugoslaviaj instruistoj alvokas ĉiujn lernejojn, kie Esperanto estas instruata, interŝanĝi informojn kaj materialojn pri jenaj instruobjektoj:

Naturscienco:

El kiaj materialoj estas konstruataj la domoj en unuopaj landoj?

Kiel en urboj?

Kiel en kamparo, arbaro, montoj, ĉemare ktp.

Kiel oni preparas la konstrumaterialon?

Socia vivo:

Turismaj vidindaĵoj en la lando, regiono aŭ loko?

Kion vi scias pri Jugoslavio?

Historio:

Revolucia tradicio kaj vekiĝo de viaj popoloj?

Kiuj estas la plej famaj homoj en via lando, kaj kion ili faris?

Kion vi lernas pri la historio de jugoslaviaj popoloj? (el lernolibroj)

Lingva instruado.

Kiaj estas viaj plej famaj poetoj kaj verkistoj? (kun ekzemploj tradukitaj en Esperanto).

Manlaboroj:

Kia estas la instruprogramo por manlaboroj? (sendi fotojn pri tia-specaj ekspoziciaĵoj ĉe la jarfino, aŭ kelkajn karakterizajn objektojn, faritajn de infanoj).

Pri ĉiuj supraj demandoj jugoslaviaj instruistoj preparas respondojn kaj materialojn de jugosl. popoloj kaj pri kono de la landoj, kiuj kunlaboras en Somera Pedagogia Semajno en Bohiny (15-25.VII.1960) sub aŭspicoj de UEA kaj Nacia UNESKO-komisiono por Jugoslavio. Adreso: Jugoslavia Esperanto-Federacio, Ljubljana, Poŝtfako 275, Jugoslavio.

En aprilo pasintjara la Centro de Esploro kaj Dokumentado entreprenis enketon pri la nombro de la geinstruistoj — esperantistoj kaj pri la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. La nombro de respondoj estas ĝis nun tiel malkontentiga, ke ankoraŭ ne estas eble kunmeti la finan trarigardon.

Kiel konate UEA nun komencis novan agadon por vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj, por pli firma kunligo de la lernantoj kaj instruistoj de lernejoj, en kiuj la internacia lingvo estas instruata kaj ĝenerale por pli efikaj rezultoj sur tiu kampo. Por ke UEA povu sukcese konduki tiun agadon, estas necesaj precizaj scioj pri kelkaj bazaj faktoj. Al tiuj apartenas la nombro de la geinstruistoj, kiuj kapablas instrui la lingvon, kaj la nombro de lernejoj, en kiuj la lingvo jam nun estas instruata. Sen tiaj bazaj scioj nenio estos farebla.

CED plilongigis la limdaton por respondo al la demandoj de la enketo ĝis 1-a de julio 1960 kaj insiste petas la geinstruistojn respondi ĝis tiu dato.

Geinstruistoj — geesperantistoj

Ĉiuj aktivaj aŭ emeritaj geinstruistoj kaj geprofesoroj, kiuj parolas Esperanton kaj kiuj instruas aŭ instruis kiun ajn objekton en kiu ajn lernejo aŭ universitato, respondu al jenaj demandoj:

1. Lando, 2. urbo, 3. nomo, 4. adreso, 5. ĉu aktiva aŭ emerita, 6. nomo de la lernejo, kie vi instruas aŭ, se emerita, instruis, 7. grado de la lernejo laŭ la leĝoj de la lando, ĉu elementa, mezgrada (liceo, gimnazio ktp) aŭ altgrada (universitata aŭ samgrada altlernejo), 8. objekto(j), kiu(j)n vi instrua(i)s, 9. ĉu vi estas preta en okazo de bezono instrui Esperanton en via lernejo aŭ en aliaj lernejoj de via urbo aŭ loko? 10. dato kaj subskribo.

Lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata

Ĉiuj geinstruistoj kaj profesoroj, kiuj instruas Esperanton en kiu ajn lernejo aŭ universitato, bonvolu respondi al jenaj demandoj:

1. Lando, 2. urbo, 3. nomo de la lernejo (nacilingve kaj Esperante) 4. tipo de lernejo a) elementa (aĝo ĝis 12 jaroj), b) mezgrada (aĝo ĉ. 12-18jaroj), c) universitato, kolegio aŭ simila altlernejo (aĝo ĉ. 18—24 jaroj), 5. ĉu por knaboj, knabinoj aŭ miksitaj, 6. nombro de la gelernantoj, kiuj lernas Esperanton laŭ sekso, 7. Ĉu Esperanto estas instruata oficiale aŭ neoficiale, devige aŭ ne-devige en kadro de la lerneja programo aŭ

DEZIRAS KORESPONDI

USSR

R. Rikk. Paide, Tallinna 54-2, Estonio — pri sporto, filatelio en Esperanto, angla, rusa kaj germana lingvoj.

Vitalij Ĉeredniĉenko, Roza Luksemburg 93-b, Tiraspol, Moldavija, 18-jaraĝa lernanto. Pri literaturo, sporto. Interŝ. bildkartojn.

Rondeto de Internacia amikeco en urbregiona Domo de pioniroj (infana klubo) korespondas tutmonde en rusa, esperanta, angla, germana kaj franca lingvoj. Interŝanĝas diversspece laŭ interkonsentoj. La leteroj de gematuruloj ankaŭ estas uzataj. La adreso: Gorkij obl.; 42, Avtozavod, Dom pionerov.

RUMANIO

Teodor Mateescu, str. Crison Nr. 6, Caransebes — 21-jaraĝa studento pri literaturo, muziko, esperanta vivo en Bulgario.

Geesperantistoj (16—45 jaraĝaj) deziras kontakti kun tuta mondo. Interŝ. PK, IK, fotojn, PM, bildojn, revuojn. Korespondas en Esperanto, franca, angla kaj itala lingvoj. Adreso: Tibulka Al. Buciumeni Fălticeki.

AŬSTRALIO OKCIDENTA

Peter M. Nill, 337 Stirling Highway, Claremont — 14 jaraĝa knabo, kun geknaboj. Interŝ. PK, IK.

ekster ĝi, 8. dum kiom da jaroj oni jam instruas Esperanton en tiu lernejo, 9. nomo kaj adreso de la instruist(in)o aŭ profesor(in)o, 10. dato kaj subskribo.

En ambaŭ enketoj la respondoj sekvu strikte la vicordon de la demandoj. La respondoj al la supraj demandoj estu nepre skribitaj sur aparta folieto de papero aŭ sur aparta poŝtkarto.

Ĉiujn respondojn bonvolu sendi al la kunlaboranto de CED por lernejoj aferoj:

S-ano David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop, Auckland, Co. Durham, Britio (Engl.)

JUGOSLAVIO

Zlata Junačko, Gajera 2, Zemuno — 26-jaraĝa fraŭlino, oficistino, pri diversaj temoj.

DDR

Otto Müller, Alaunstrasse 2, Dresden N 6 — interŝ. E-gazetojn.

Detlev Blawke, Thierfelden 9/24, Rostock — 18 jaraĝa studento de la ekonomiaj sciencoj, kun gestudentoj.

POLLANDO

Tamasz Sobiech, Biala Podlaska, ul. Prosta 4 woj Lubelskie — interŝ. PM kun serioza filatelisto.

HUNGARIO

Aleksandro Kajti, str. Terez 9, Pecs — nova esperantisto interŝ. esperantaj gazetojn.

Bata Margareta, Mezö Imre ut. 25, Budapest VIII — kun bulgaraj gekamaradoj.

ANGLIO

J. K. Jump, Esperanto, Temple Schol, Rochester, England, deziras aranĝi ekspozicion de lernejoj gazetoj, revuoj, bultenoj, ktp nacilingvaj aŭ esperantaj. Ĉiuj lernejoj aŭ samideanoj, kiuj sendos al li gazeton ktp., ricevos ekzempleron de lia lerneja revuo, kiu aperas trifoje en la jaro.

NEDERLANDO

H. Thien, Uiterwaardenstraat 12/II, Amsterdam, Nederlando posedas la plej grandan kolekton de Zamenhofaj fotoj — pli ol 180. Mi liveras ekzemplerojn de la fotoj al la petantoj nur kontraŭ la efektivaj elspezoj por kopiado kaj poŝtelspezoj. Interesantoj petu liston de la fotoj.

BULGARIO

Slavĉo Bojĉev, Krajna str. 2, Stara Zagora — en esperanta, franca, angla kaj turka lingvoj. Por paco, reciproka gastado.

